

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1971 2

KULTURAJ KAJEROJ

1971 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo A. Frangeul

Minorko
« Cindrulino » de Balearoj

Vivo kampara laŭ ritmo pasinta (fino) P. Métivier

Sur la spuroj de l'homo prahistoria H. Röllinger

Dezerto kaj energio

Mistero Miss Marple

Por via distro

Nia konkurso P. Chevalier

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

El Grésillon

La printempo nun tuŝis la arbojn de Grésillon, kies branĉoj streĉiĝas post la longa vintra dormo. Jam floroj ekaperas el sub la tavoloj de mortintaj folioj en la parko. La fenestroj de la kastelo malfermiĝis por ebligi la printempon sentigi sian alvenon ankaŭ en la ĉambroj. Bonaj sindonemaj geamikoj jam pretigas ĉion, por ke la unuaj restadantoj sin sentu hejme. La belaj tagoj ebligos, post la Paskaj ferioj, la plibonigon de kelkaj ĉambroj. La nova jaro ne komenciĝas la 1-an de januaro sed fine de marto en Grésillon.

La Ĝenerala Asembleo okazis la 21-an de marto, precize la unuan tagon de printempo. Tra la precizigoj donitaj pri la aktiveco kaj la financoj, la ĉeestantoj povis sekvi la vivon de nia Kulturdomo en 1970. Ili konstatis, ke ni antaŭenpaŝas eĉ se ne per sufiĉe longaj paŝoj. Pli kaj pli diskoniĝas Grésillon, kiu en 1971 akceptos ankoraŭ pli da eksterlandanoj oi dum la antaŭaj jaroj. La kastelo estos preskaŭ plenplena dum la 10-a Kultura Semajno de Pasko. La unua periodo de julio anonciĝas favora. Ni ne plu povas akcepti gesamideanojn por la Postkongreso de S.A.T., kaj la kvara periodo verŝajne vidos la partoprenon de granda nombro da usonaj kaj germanaj gejunuloj. Nur la dua periodo, kiu bedaŭrinde okazos samtempe, kiel la kongresoj de Londono kaj Parizo, ankoraŭ ne ŝajnas ricevi tre grandan intereson. Tamen, la ekskursoj kaj la prelegoj, el kiuj ege interesa serio fare de S-ro Röllinger pri la « Prahistoria Arto », estas allogaj. Tiuj el vi, kiuj ĉeestos la U.K. en Londono aŭ la S.A.T.-kongreso en Parizo povos ankaŭ partopreni la unuan semajnon de tiu Kultura kaj Turisma periodo. Kaj ni estas certaj ke ne ĉiuj el vi vizitos la kongresojn. Do Grésillon malfermas por vi siajn brakojn ! Petu informojn.

VI DEZIRAS VIZITI LA ESPERANTISTAN KULTURDOMON DE GRESILLON ?

Ne pli longe atendu :
Petu la someran programon

E. K. D. Grésillon - 49 - BAUGÉ (Francujo)

Esperanto tra la Mondo

LA UNIVERSALA KONGRESO EN LONDONO

— Se vi ne ankoraŭ enskribiĝis por la kongreso, faru tuj ĉar la limdato por loĝej-mendoj estos la 20a de Majo !

— Interesa programo de ekskursoj estas starigita. Krom la rondvojaĝoj en Londono, busoj povos laŭ elekte konduki la partoprenantojn al Cambridge, Blenheim Palaco, Oxford, Warwick, Stratford-on-Avon, Windsor, k.t.p...

— La gazeto « Heroldo de Esperanto » de la 16a de Marto aperigis specialajn paĝojn pri Londono, angla vivo, praktikaj informoj tre utilaj.

— Por la ĝenerala kunveno de la kongreso, la estraro de U.E.A. elektis la temon : « La problemo de lingva komunikado en la nuntempa mondo ».

— Por la oratora konkurso por la junularo la estraro elektis tri temojn. Rajtas partopreni ĉiuj gejunuloj ĝis 28 jaroj. La unua premiito ricevos 100 ned. gld., la dua, 70 gld., la tria 40 gld.

LA S.A.T. KONGRESO EN PARIZO

— Ĉiuj programeroj de la kongreso okazos en la fakultato de Orsay apud Parizo, eĉ la manĝoj kiuj okazos en la liberserva restoracio de la fakultato.

— Por la tendumantoj la O.K.K. zorgas pri tendumejo sed la ruldomoj povos stari en la parko mem.

— Vizitoj okazos en la Metro, grandaj magazenoj, kaj en fajrobrigado.

— La programo de la kongreso entenas interesajn prelegojn, agrablan distran parton kun... tipe pariza spektaklo en « Concert Mayol ».

RENKONTOJ EN EUROPO

— Internaciaj feriaj esperanto-kursoj en Helsingör (Danlando) 25-7 — 1-8 kaj aŭtunaj feriaj esperanto-kursoj, en Arhus, 17 -23 .10. Petu informojn al Sro L. Friis, Ingemannsvej 9 DK-8230, Abyhöj, Danlando.

Internacia Ferio-Semajno, en Krommenie, 8-15 -a de Aŭgusto. Skribu al S-ino J.A. v/d Meulen V. Harten, Popelstr. 13, Krommenie, Nederlando.

— Sestaga restado en Gotenburg, Svedujo. 24-29 a de Julio. Petu informojn al Agadgrupo por esperanto, Box 55028, S-40053 Gotenburg, Svedujo.

— Dum la tuta somero, vi povos agrable restadi en la esperanta libertempa vilaĝo de Primošten, apud Šibenik, Jugoslavio.

— Internacia renkontiĝo de kampadistoj-esperantistoj, en Balaruc-les-Bains (Suda Francujo), apud la Mediteraneo kaj lago Thau, 1-15 a de Julio. Skribu al Sro Lantaigne, 34 Balaruc-les-Bains (Francujo).

— Feriosemajno en Svislando, apud Füringen, apud la lago de la kvar Kantonoj, 5-11 a de septembro. Aliĝoj al E. Glattli, Laurstr. 17, CH-5200 Brugg (Svislando).

— Internaciaj ferioj en Miedzygorze, Pollando, 17-30a de septembro. Skribi al P.E.A., Vroclava Filio, poŝtkesto 16, Wroclaw 17 (Pollando).

— Junulara Tendaro, en Kiev (Sovetunio), 26-7 — 7-8. Informoj : Politeĥniĉeskit Institut, Esperanto-Klubo, Kiev-56, (Sovetunio).

— Komuna kongreso por geesperantistoj el Francujo, Belgujo, Britujo kaj najbaraj landoj okazos de la 29a ĝis la 31a de Majo. Skribu al S-ro Ditacroute, 178, chemin Castre, 62-Calais (Francujo).

— Volontula labortendaro akceptos esperantistajn junulojn (kursoj okazos), en Roccasocca (centra Italujo), 17-31a de julio. Skribu al Nino Vessella, via Panniglia 54, I-03030, Roccasecca Scalo (Frosinone), Italujo.

ESPERANTO EN UNIVERSITATO DE GRAZ

D-ro K. Perko ricevis la komision instrui esperanton po du lecionoj semajne en la universitato de Graz (Aŭstrujo).

ESPERANTO EN LERNEJOJ DE 31 LANDOJ

Pli ol 16 mil personoj studis Esperanton en lernejoj diversnivelaj dum la instrujaro 1968-1969 laŭ la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo. La studantoj troviĝis en 31 landoj kaj 5 kontinentoj. Laŭ la raporto, Esperanto estas studtemo plej ofte en la mezgradaj lernejoj kaj malplej ofte ĉe la altgrada kaj universitata niveloj.

Polujo, kun 3300 Esperanto-lernantoj, montriĝis la gvidanto laŭ la statistikoj, kvankam Hungarujo instruis Esperanton en la plej granda nombro da lernejoj (96). Hungarujo instruis ĝin ĉefe en elementaj lernejoj kaj kompare nemulte en la mezgradaj. Ĝuste la mala reguleco evidentiĝis en najbara Bulgarujo, kiu kaptis la unuan rangon ĉe la mezgrada nivelo per 1429 lernantoj en 38 lernejoj.

En la altgradaj lernejoj la gvida lando estis Japanujo, kun 420 Esperanto-studantoj en 35 institutoj. Kaj Bulgarujo refoje montriĝis la lando plej vaste instruanta la internacian lingvon al universitataj studentoj (393 el ili), kvankam la lando kun plej multaj apartaj Esperanto-instruantaj universitatoj (7) estis Usono. Eĉ Gronlando, kun unu elementa lernejo instruanta Esperanton al 20 infanoj, enlistiĝis inter la landoj partoprenantaj ĉi tiun unikan eksperimenton pri edukado por internacia komunikado.

SE VI DEZIRAS KORESPONDI KUN USONANOJ

Vi povas skribi al F-ino Ellen Lewis, 15, Salisbury Rd., Brookline, Mass. 02146 Usono, direktorino de koresponda servo de Esperanto-Ligo de Nord-Ameriko.

ĈU VI LEGIS TIUJN LIBROJN ?

— « Pri internacia lingvo dum jarcentoj » enhavas eldirojn kaj skribaĵojn de pli ol 200 fame konataj personoj kaj instancoj pri la lingva problemo aŭ internacia lingvo, kompilitajn de Isay Dratwer.

— « Disko » la kvara kolekto de Johan Hammond Rosbach, konsistas el 17 noveletoj (originale skribita en Esperanto).

— « Soleco » romano de Victor Catala, tradukita de la kataluna lingvo.

Minorko, "Cindrulino" de Balearoj

Dum lia restado en Versajlo, post la venkopreno de Minorko, la Marŝalo-Duko de Richelieu ne ricevis la esperitajn laŭrojn. Malŝate, Ludoviko la XV-a de la fundo de la Speguloj-Galerio, demandis lin : « Kiel vi trovis la figoj en Minorko ? ». Tiu indiferenteco malprave daŭris ĝis niaj tagoj. Sen montri lukson, kiel Majorko, sen lumece radii, kiel Ibiza, la personeco de Minorko alportas sian propran sigelon en Mediteraneo.

Kiel taksio, aviadilo iras de Palma al San Luis ; pere de luitaj aŭtomobiloj oni povas facile iri de la kalkumitaj Kartago-muroj al la rokaj kvazaŭbretoniaj bordoj. La legendo rakontas, ke la granda Hanibalo estus tie naskiĝinta, kaj ke lia frato Magon donis sian nomon al haveno Mahon, la hodiaŭa ĉefurbo.

En 1756 la grafo de Lannion (Bretonio) ricevis estradon de Minorko. Li retrovis armorikan pejzaĝon en la norda bordo de la insulo : ĝiaj larĝaj entrančaĵoj en Albufero, Farnells kaj la plej profunda en Mahon, povas ricevi eĉ la mediteraneajn eskadrojn : de la oritaj ŝipoj de admiralo de la Gallissonnières ĝis la milit-ŝipoj de la U.S.-ŝiparo ; la antikva fuorto San Felipe fronte al Lazaret-Insulo defendas ĝin kiel dua Gilbraltaro.

Maldekstre de la estuaro etendiĝas la bazo, kiun la Britoj konstruis en la XVIII-a jarcento kaj nomis « Georgetown » ; pli poste la hispanoj rebaptis ĝin « Villa Carlos ».


Sur distanco de 3 mejloj inter promontoroj kaj golfetoj sinsekvas insuletoj similaj je grundintaj veseloj.

En 1287 Aragon-Reĝo, Alphonse la XIII-a elŝipiĝis sur insulon, kiun li nomis « Reĝo-Insulo » kaj kiun li forprenis de Saracenoj. Tie estas malnova hospitalo, simila je monaĥejo, kiu donis al tiu insuleto, sian kromnomon : « Sanga Insulo » ; tiuj malĝojaj memoraĵoj estas tuj malaperontaj, ĉar tiu hospitalo baldaŭ iĝos luksa hotelo.

Plej pitoreska estas Mahon kun siaj krutaĵoj kaj ŝtuparoj kiuj igas ĝin tute ĝiba ; ĝiaj kontrastoj plaĉas al la turistoj : arabaj arkaĵoj, severaj korbel-fenestroj, kolonoj de neo-klasikaj preĝejoj : la klostro de Karmenpreĝejo, centre de la urbo, ne plu izolas silentajn ĉelojn inter siaj pilastroj stukitaj de konkoj ; hodiaŭ foiro ĝin animas en familiara miksaĵo de viandoj, legomoj kaj frandaj fruktoj.

La plej bela strato de Mahon estas tiu, en kiu naskiĝis la doktoro Orfila, kiu estis la granda patrono de la franca medicino en la XIX-a jarcento, kaj la timinda toksikologo de Lafarge-afero.

En la restoracioj de Barranco-kvartalo ĉiuj krustacoj baniĝas en saŭco flava, kaj oleeca : estas la « mabronera », kiu venis al ni sub la nomo de majonezo : ĝin inventis la ĉefkuiristo de Marŝalo de Richelieu dum la sieĝo de Mahon.



Ambaŭflanke de la estuaro du belaj domoj el « georgian » arkitekturo vidalvide staras : la « Domo de la Admiralo » tiam loĝita de Lordo Collingwood kaj la pli majesta « Or-Farmo » en San Antonio, tiama ĝenerala kvartiro de Horatio Nelson. Pere de teleskopoj, la du admiraloj povis interkonsenti pri la movoj de sia respektiva floto.

Collingwood, kiu anstataŭis Nelson, mortis proksime de Mahon, sur sia ŝipo, en kiun li estis transportinta sian ĉerkon. La Minorkanoj, eble iom ĵaluzaj pri la renomo de G. Sand kaj Chopin en Majorko, certigas, ke Nelson pasigis en « Or-Farmo » plej feliĉajn tagojn kune kun sia kara Lady Hamilton. Tamen nek la Hotelo, nek la parfumo, kiuj portas la nomon de la « Divina Lady » povas aŭtentikigi tiun sentimentalan rendevuon.

Antaŭ ol ekiri sur la unika granda vojo, kiu trairas la insulon kaj interkomunikigas Mahon kaj Ciudadela, distancaj je 45 km., ni faru, per aviadilo, pilgrimadon al urbo San Luis ; ĝi restis, nedifektita, tia, kia ĝi estis post ĝia konstruo en la « Jarcento de Lumoj ». Sur la « Bieno de Louis XV » la francoj kreis en 1761 harmonian ensemblon de malaltaj blankaj dometoj arigitaj ĉirkaŭ preĝejo, kiu similas tiun de St Thomas d'Aquin en Parizo ; sur ĝia frontono orgojle montriĝas la blazono de Louis XV.

Ni ankaŭ vizitos Alayor la « Montpellier de Minorko » kaj Monte - Toro, kie oni rakontas ke juna taŭro gratis la teron por retrovi la refigurajon de la Virgulino.

Meze de kampoj megalitaj monumentoj igas Minorkon paradizo por la arkeologoj : jen bibliaj norioj : jen el la Bronzepoko, la strangaj « Talayots », « Navetas », kaj « Taulas » ;

ili estas ŝtonaj konstruaĵoj kiuj memorigas la « nourraghès » de Sardio.

La « Talayots » ŝajnas dikmalaltaj turoj, konstruitaj per supermetitaj blokoj ; longtempe la Minorkanoj ilin imitis por konstrui ŝton-barakojn, en kiuj ili rifuĝis okaze de invado.

La « Navetas » pli grandaj, profiliĝas kiel ŝipoj kun la kilo supren ; la « Nave » de Estudons, apud Ciudadela, montras nedifektitan ekzemplon.

La « Taŭlas » (en la popola dialekto signifas « Tablo ») desegnas enorman « T » en la minorka kamparo. Sendube estas antikvaj altaroj sur kiuj oni oferbuĉis bestojn, kies restaĵojn oni trovis en la ĉirkaŭaĵoj ; ilia mirinda alto pravigis la gigantismon de la unuaj loĝantoj en Balearoj.

Jen ni estas ĉe la pordoj de Ciudadela, la urbo patricia, kiu estis la antikva ĉefurbo ; ĝiaj remparoj rezistis al Ali Fascha ; ili konservis fieran aspekton, same ankaŭ ĝia katedralo en kiu, grandparade, oni celebris la tiaman venkon de la franca Reĝo.

En stratoj kun arkadoj la komercistoj vendas (parolante romindan dialekton, iom malproksiman de la tradicia hispana lingvo) ŝuojn, kiuj estas la riĉeco de tiu regiono.

Ĉi tie, malsame de Majorko kaj Ibiza, preskaŭ kun bedaŭro oni konstruas hotelojn. Oni pensas, ke ilia siluetoj misornamas tiujn de la malnovaj muelejoj kaj tiujn, multe ornamitajn, de la barokaj palacoj.

La minorka riĉeco daŭre vivas dank'al la prapatra komerco kaj ankoraŭ dormas en la blazonitaj kofroj.

Minorko simpatie akceptas la turistojn, kvankam ĝi ne tiel multe propagandas kiel la aliaj Balearoj ; 120 plaĝoj, preskaŭ dezertaj igas Minorkon sablohorloĝon, el kiu la tempo rifuzas forflugi. La baleara « Cindrulino » neurĝeme deziras renkonti sian « Ĉarman Princon ».

John van Rollefhem (el T.C.F.)



VIVO KAMPARA

LAÙ RITMO PASINTA (fino)

Dum la jaro estas multaj aliaj rilatoj sed ne tiel amasaj. Ilî limiĝas al okazaj interhelpoj por ordinaraj laboroj inter nur du najbaroj sed ĉiam regis la samaj kutimoj. Neniam mono estis proponita kontraŭ servo ; tio estus grava ofendo, manko de konsidero. Oni nur atendis okazon doni helpon reciproke.

Jen septembro, ĉiu retrovas siajn individuajn laborojn. Oni baldaŭ pensos pri novaj semadoj, fruktorikoltoj, vinberrikolto kaj en aŭtuno prezentiĝas foje ankaŭ kuriozaj spektakloj. Se farmisto translogiĝas, forlasas sian farmon luitan por instaliĝi en alian pli konvenan laŭ sia deziro, tio okazas la I-an de novembro. Oni facile imagas ke ne estas bagatela afero transporti la tutan ilaron, bestojn, meblojn, parton de rikolto al alia farmo kiu situas foje je pli ol 10 kilometra distanco. Ankaŭ tiuokaze oni petas helpon de la amikaj najbaroj. Ĉirkaŭ dekduo da grandaj ĉevalaj ĉaroj estis necesaj por la translogiĝo. Ĉiuj ĉaroj ŝarĝitaj viciĝas sur la vojo antaŭ la farmo dum la matenaj horoj kaj je la 12-a horo akurate la karavano ekmoviĝos. Ankaŭ ĉitie tradiciaj reguloj manifestiĝas en la ordigo de la tuta afero. Ne apartenas al iu ajn transporti la meblojn. Tiun honoran taskon plenumas ĉu fratoj, ĉu bofratoj se ili ekzistas, se ne, tiun rolon transprenas la plej intimaj amikoj. Ili marŝos antaŭe en la vico survoje. Poste, viciĝas ĉaroj ŝarĝitaj de ĉiuj iloj troveblaj en farmo kaj, kredu min -ili estas multaj. Estas bela okazo por fari inventaron. Multegaj objektoj senvaloraj plenigas ankaŭ plurajn ĉarojn ĉar oni ne volas forlasi ion ajn al la nova farmisto kiu eklogos tuj post la 12- horo samtage.

Ankaŭ partoprenas la ekspedicion la kokinoj, kunikloj, anasoj k.t.p... La katoj, kondiĉe ke oni sukcese kaptis ilin, vojaĝas grimace en kaĝo. Tiu bestaro pitoreske troviĝas ĉe la vosto de la karavano, kaj tute laste, malantaŭ la lasta veturilo, malgaje sekvas la hundo. Ĝi devas piediri kaj mallonga kateno malpermesas al ĝi esplori la novan regionon dum la vojaĝo. Kiel aldono al tiu pitoreska elmigra karavano foje troviĝas en la farmo maljuna avino kiu ne plu povas malproksimiĝi el sia fotelo. Do, oni suprenlevas ŝin kaj ĉe la supro de ĉaro ŝi fiere surtroniĝas meze de la kaldronoj kaj marmitoj alkroĉitaj ĉiuflanke.

Ĉio estas preta, oni nenion kaj neniun forgesis. Nun, antaŭen. Ni ne misuzu la horojn ĉar en tiu sezono jam rapide noktiĝas kaj estus bone atingi la celon antaŭ la kompleta malhelo. Aparte foriros la bovinaro ĉar ili ne paŝas samrapide kiel la ĉevaloj. Al seriozaj junuloj estas konfidata tiu sufiĉe delikata misio.

La etoso ĝenerale ne estas tiel gaja kiel okaze de la someraj draŝadoj. Ne estas tempo por festeni. Oni eĉ manĝas rapide kaj simple. Kompreneble ĉio estas for de la domo, kaj alvenonte en la novan loĝejon nenio estos instalita. Sed nenio estas perdita. La granda festeno de la translogiĝo kiel danko, okazos la postan jaron en printempo, en la trankvileco de kompleta reinstaliĝo. Tiam, ĉiuj parencoj, amikoj, najbaroj kiuj helpis en tiu kolosa transporto estas invitataj kun edzinoj kaj infanoj. Vera bankedo kie ankoraŭfoje oni multe rakontas pri la pasinteco.

La tempo forflugas kaj la sinsekvo de la sezonoj senkompromise gvidas la vivon kamparan. Se dum la fajraj tagoj de la somero la prizorgado de la rikoltoj kondukis la homojn al kulmino de socia vivo dum kiuj ili ĝoje efektivigis la grandan laboron, baldaŭ la longaj vintraj vesperoj redonos novajn interamikajn kunvivadojn. Jes, tio estas la bona flanko de la vintra sezono. Mallongaj estas la tagoj kaj ofte pluvas, ventas, sed ne gravas. La ĉefaj laboroj estas finitaj, ni povas atendi. Nenio urĝas plu. Ni povas respondi : jes - je la invitoj vesperadi... ĉe la najbaroj. Bone memoru ke en tiu tempo, kiu jam ŝajnas malproksima kvankam nur kelkjardeka, ne estis elektro en niaj kamparoj. Estis la heroa epoko de la petrolaj lampoj. Alvenas la vespero fiksita. La tuta familio, kiel fantomoj survojiĝas en la nigra nokto. La patro iras antaŭe tenante la lanternon kies flamo malcerta onde tremas je ĉiu ventoblovo. Por ŝpari tempon, foje, anstataŭ sekvi straton oni iras tra la kampoj laŭ bone konataj vojetoj. Ja, tio estas aventuro por la infanoj kiuj certe longe memoros.

La hundoj jam anoncas nian alvenon kaj malfermiĝas la pordo de la amika domo. Tuj ĉe la enirejo oni sentas la etoson de kvazaŭ familia kunveno. Ni deponas la lanternon sur la pavimon en angulo de la vasta ĉambro, kaj ĉiuj trovas sidlokojn antaŭ la larĝa kameno. Ni estas en granda tipa far-


ma ĉambro kiu utilis la tutan jaron kiel akceptejo, manĝejo, por la ĉiutaga vivo kiel por la grandaj okazaĵoj — festenoj laboraj aŭ festenoj pure festaj. Tre dika trabo farita el la tuta trunko de fortika kverko subtenas la plafonon en la mezo. Ne forgesu ke supre, en la grenejo, ankoraŭ ripozas la tuta cereala rikolto. Meze pendas la petrola lampo sed la plej forta lumo venas el la kameno kie la longaj flamoj sin ĵetas alten en senĉesa serpentema gimnastiko. Estas agrable ĉi-tie. Ŝajnas ke la tempo haltis. Estas multaj aferoj por rakonti. Certe oni jam tion aŭdis multfoje dum la pasintaj jaroj ĉirkaŭ la sama kameno... Sed, tio ne estas kaŭzo por enui, tute ne. Pensu, ĉu estus pli taŭga momento kaj pli konvena loko por remorigi ĉasistajn aventurojn, veterajn katastrofojn, la lastjaran rikolton aŭ tute simple rakonti ion « tute sekrete » pri la okazintaĵoj de la vilaĝo ? Dume, oni ne neglektas vivigi la fajron per nova dika ŝtipo kaj brancofasko por havi flamojn. En la pato kun longa tenilo rostiĝas la kaŝtanoj. Ili estas la ĉefa bonveniga simbolo. Aldone al tio, ankoraŭ pli ol ordinare, eliras el la duonmistera ŝranko diversaj likvoroj kiuj certe ne havas laktan odoron. Estas jam malfrue en la nokto. Estas tempo foriri, disiĝi, sed antaŭe oni volas akiri la promeson de la repago. Niavice, ni invitas, kaj dum la vintro okazos multaj aliaj interŝanĝoj, aliaj vesperadoj.

Tiamaniere, pli agrable forpasas la vintraj monatoj ĝis kiam la renaskiĝanta naturo ree alvokas la homojn al la kampaj laboroj.

Tra la jaroj kaj certe tra multaj generacioj estiĝis streĉaj amikaj ligiloj meze de la iama pli dense loĝata kamparo. Sed, iam aperis la vorto evoluo kun siaj satelitoj : modernismo, teknika progreso, rapideco, bruo, konsciiĝo pri stato de forlaso meze de arkaika naturo, kaj la nuna kamparo prezentiĝas kiel vasta uzino kie oni senĉese moviĝas kun bruaj motoroj en konstanta urĝeco.

Io rompiĝis en la valoroj de la naturo. Ne plu estas tempo por paroli. Nur ĉiu por si-mem paŝas kvazaŭ en dezerto.

Pierre METIVIER.



SUR LA SPUROJ DE L'HOMO PRAHISTORIA

Dum la Kulturaj kaj Turismaj Ferioj (25-7 — 7-8 1971) de la Esperantista Kulturdomo Grésillon, S-ano el Bad Kissingen (F.R.G.) S-ro Röllinger faros diversajn prelegojn el kiuj kelkaj temos pri la unuaj paŝoj de la Arto. Sro Röllinger ne kontentiĝas per scioj kiujn li lernis el libroj ; li ankaŭ ne kontentiĝas per rapida rigardo al la homaj kreaĵoj kaj... rapida posta forgeso. Li ĝisfunde studis ĉiujn aspektojn de la mirindaĵoj kiujn multnombraj jarcentoj bonvolis lasi al ni. Li efektive vizitis ĉiujn belaĵojn kiujn li « rakontas » al ni kun granda kompetenteco kaj ankaŭ kun granda amo.
Sed legu nun kiel li prezentas mem tiun entuziasmigan kaj iom misteran temon :

Al la plej mirigaj eltrovoj de la lastaj 100 jaroj apartenas la naturaj kavernoj, kiuj kelkfoje etendiĝas sur pluraj 100 m., profunden en la rokon, en Sudfrancujo kaj Nordhispanujo, kie mirige bone konserviĝis, hermetike izolitaj dum jardekmiloj, pentraĵaj verkoj de la prahistoria homo, donantaj al ni informojn pri la vivo de la homoj en la tiama periodo de la finiĝonta glaciepoko. En tiu epoko, do en la prahistoria, nek en la romia aŭ greka, nek en la egipta aŭ mesopotamia antikvecoj, perdiĝas la naskiĝo de la arto.

Ĉi-tiu efektive plej antikva arto « sur jena nia globo » komenciĝas per gravuraĵoj ; Ĝi iĝas desegnaĵoj en la profundoj de la kavernoj kaj, jardekmiloj pli poste, je la finiĝo de tiu prahistoria epoko (antaŭ ĉirkaŭ 12.000 jaroj), polikromiaj pentraĵoj en majstra perfekteco.

Al kiu sin okupas pri tiuj verkoj iom pli ol nur supraĵe, al kiu rigardas ilin ne nur okaze, pasante kiel « turisto », al tiu, tiuj desegnaĵoj kaj bildoj kvazaŭ « parolas ».

Tiam, tiuj plej antikvaj gravuraĵoj kaj eĉ polikromiaj bildoj kvazaŭ devualiĝas kaj komencas rakonti. Kiam oni estas vizitinta kelkajn pentrumitajn kavernojn kaj sin submetas al la impresoj de la praepokaj prezentaĵoj, tiam la verkoj mense formiĝas al perceptebla tutaĵo. Ili prezentas sin al ni kiel kvazaŭa « bildskribo de la praepoko », formita de homaj manoj jardekmilojn antaŭ la invento de la kojniforma aŭ hieroglifa skribo.

Dum 7 jardekoj la faksciencistoj nun studis kaj komparis milojn da bildoj tiaspecaj, trovitaj en pli ol 150 diversaj eŭropaj kavernoj.


Nuntempe oni bone scipovas distingi la originojn, la evoluon kaj la diversajn epokojn kaj stadiojn de tiu arto. Evidentiĝas nuntempe klare diversaj stiloj, diversaj « skoloj » de tiuĉi plej antikva arto, kreita dum la dua epoko de la lasta glaciepoko « Würm », kiu komenciĝis antaŭ ĉirkaŭ 100.000 jaroj kaj daŭris ĝis ĉirkaŭ 10.000 jaroj antaŭ nia erao.

Multe pli ol ĝenerale supozate, tiuj artverkoj rakontas al ni pri la vivmaniero, la ĉasmetodoj, la magiaj ritoj kaj prareligio de la « Homo de Cro-Magnon ».

Kiu povas admiri ekzemple en la kaverno « Altamira » (Hispanujo), la tiel nomita « Kapelo Sikstina de la glacia epoko », aŭ en aliaj kavernoj kiel El Castillo, Font de Gaume, Lascaux, k.t.p. la desegnaĵojn kaj pentraĵojn de la homo glaciepoka, staras vid-al-vide al monda miraklo de la homaro kun miriga esprimforto, kiu raportas al ni pri la efektive plej malproksima pasinteco de la homa ekzistado. Pri tio, ekzemple, diras Herbert Kühn, profesoro pri prahistorio, membro de la Akademio de la Sciencoj :

« ... Kaj jen la surpriziga kaj preskaŭ nekomprenebla : la bildoj ne estas primitivaj, neperfektaj, nelertaj ; tute male : ili apartenas al la plej grandiozaj, kion kreis homoj kiel artaĵojn sur nia tero. ...De bildo al bildo vagas la rigardo de la vizitanto en tiuj « pinakotekoj de la glaciepoko » ; li estas kaptita de la grandioza majstreco de la streko, de la vivanteco de la formigo. Por ĉiu vizitanto la momento estas neforgesebla, kiam li staras antaŭ tiuj pentraj verkoj de la homaro, kiuj estas prahistorie la efektive plej antikva kion kreis homoj iam ajn. ... La fantomeca karaktero de tiuj kavernoj, la unika impreso pri tiu arto kaj la imago pri la eterneco kunliĝas sin unu al la alia al la spirite plej ekscitiga travivaĵo, kiun povas ĝui iel ajn ni homoj sur nia Tero ».

Hugo Röllinger



Ĝirafoj el « Cerro de el Asle-Bukerch » Esmara (Hisp. Sahara)

Dezerto kaj energio

MUTACIO DE LA DEZERTOJ

Largmaŝa orlo kuras laŭlonge de la dezertoj sur nia planedo « Estos la orlo de la prospero en la jaro 2.000 », diras, ridetante, Alvin Weinberg, profesoro en la famekonata Oak Ridge-laboratorio. Oak Ridge estas la luiilo de ciuj genio-fulmoj ĉe la usonaj atomistoj. Do ne estas mirige, ke, tie, oni imagis tiun faman orlon, kiu, en la jaro 2.000, borderos la dezertojn en Hindio, Afriko, kaj Sud-Ameriko.

Ĉiu maŝo de tiu giganta orlo reale estos fantasta instalaĵo, kiun la Oak Ridge-serĉistoj nomas « Nuklea agro-industria Komplekso ».

Estas nur de antaŭ kelkaj jaroj, ke D-ro Alvin Weinberg kaj lia taĉmento raportis antaŭ Usona Agronomio-Societo pri tiu « Komplekso ». Ii ankaŭ opiniis, ke Energio estas la fundamenta kruda materialo necesa al nia Industria Civilizacio.

Tiu Komplekso estos ellaborita ĉirkaŭ Nuklea Centralo, kiu liveros elektran potencon je 2.000 mega-ŭatoj (ĝis nun la ekzistantaj nukleaj centraloj kapablas liveri nur 1.129 megaŭatojn). Konstruita ĉe marbordo, sur grandega artefarita soklo, flosanta aŭ stivita sur enakvigita fostaro, tiu Centralo provizos du uzinĉenojn : industriajn uzinojn kaj agrikulturajn uzinojn.

La industriaj uzinoj produktos metalojn por konstruado en la ĉirkaŭanta regiono (ĝis tiam dezerta kaj senhoma) ; esence estos aluminio kaj ŝtalo. Ŝipoj alportos metaldonajn ercojn kaj dank'al tiu tre malkara energio de la Centralo la tuto de la metalurgiaj operacioj tre malmulte kostos.

Agrikulturaj uzinoj : Per elektrolizo, kiu permesos grandskale disigi la elementojn de la salakvo, oni ricevos grasigaĵojn bonkvalitajn.

Dolĉa akvo : La sub-produkto de tiu operacio estas post sinsekvaj distiladoj, dolĉa akvo. En Oak Ridge, en 1964, oni ricevis 4.500 litrojn da dolĉa akvo por nur 3 kilo-ŭatoj hore ; oni esperas ke, post dek jaroj, la rezultoj pliboniĝos je 25 %.

La Oak-Ridge-projekto estas pli postulema : en 1980 - 1990, la Nuklea Komplekso, kun du grandaj Centraloj, liveros, por tre malalta prezo, ĉiutage, 4 miliardojn, 500 milionojn da litroj da dolĉa akvo. Parto de tiu akvo, sendita al 120.000 hektara farmo permesos ultra-intensan kulturon, t.e. certigas P-ro Perry Stout en Kalifornia Universitato 3 rikoltojn jare, kiujn traktos kaj konservos 100.000 personoj (tie, kie, antaŭe, estis absoluta dezerto).

En orienta Mediteraneo, eksperimento jam donis 2 rikoltojn jare kaj 70 kvintalojn da tritiko pohektare.

Tio neniigas la demandon : ĉu la rezultoj estos bonaj kun distilita akvo ? Aŭtomataj detektiloj senhalte mezuras la procenton de la grundo-humideco kaj ekfunkciigas aŭ haltigas irigacion.

Promesplena estas estonteco : la malbenitaj dezertoj malaperos dank'al Sciencaj Realigoj. Jam en Hindujo, en duoninsulo Gujarat, oni instalas Nuklean Komplekson.

Energio

Malfacilaĵoj : La teraj Centraloj ĉerpas energion el akvofaloj, el brulado de karbono, mazuto, uranio, plutonio, k.t.p....

Tamen, post du jarcentoj, la elektraj bezonoj superos je 30 % la eblajn fontojn.

Tia estas la opinio de la Soveta Sciencisto Babat, specialisto ĉe nuklea energio, kaj de lia amerika kolego Peter Glaser.

Jam oni devas limigi la nombron de la Elektraj Centraloj. Tiuj Centraloj, ec hidraŭlikaj, produktas varmon kaj varmigas la bobenadojn de la transformatoroj kaj la kablojn de la alttensiaj linioj. Tiu varmo radias en atmosferon kaj pliigas la ĉirkaŭantan temperaturon. La Termikaj Centraloj, kiuj brulas klasikajn aŭ nukleajn brulaĵojn varmigas enorman kvanton da akvo, kiu, poste, jetiĝas en riverojn aŭ en maron.

Sciencisto Babat opinias, ke tiu « parazita » varmo ne povas superi je 10 % la sunan varmon. Pliigo de la atmosfera temperaturo povus danĝere sanĝi nian klimaton kaj fundamente transformi nian vegetalaron en vastaj regionoj kaj... multigi la dezertojn.

Suna Centralo

La du sciencistoj opinias, ke la plej bona rimedo estus konstrui la estontajn grandajn elektrajn Centralojn alie ol sur Tero. Por P-ro Babat la estonta Centralo estas tiu, kiu konvertas en elektran kurenton la enorman potencon de la termonuklea fandiĝo, tiun ĉi mem, kiu okazigas la eksplodon de la H-bombo. Be-

daŭrinde ĝis nun oni ne sukcesis certe kontroli tiun termonuklean fandiĝon. Oni ne povas antaŭvidi ĉu oni sukcesos kaj kiam.

Amerikano Peter Glaser, estro de la sekcio « Aplikataj Sciencoj », en Cambridge-Massachusetts, turniĝas al alia kategorio de orbitaj Elektraj Centraloj : la Sunaj Centraloj.

La principo de tia Centralo estas simpla : preskaŭ ĉiutage ĝi estas kontrolita ĉe la funkciado de la generatoroj en la spacaj veseloj (ĉe loĝataj veseloj aŭ ĉe aŭtomataj observatorioj).

La Suna Energio prezentiĝas sub du formoj : Lumo kaj Varmo ; dank'al konvertiloj, fotoelektraj aŭ termoelektraj ĉeloj, oni ricevas elektran kurenton.

Peter Glaser imagas, ke oni satelitigas, sur sensanĝa orbito, je 35.600 kilometroj super la ekvatoro, du gigantajn panelojn kovritajn je sunaj ĉeloj (diametro : 5,5 km. - surfaco : 20 km2). Ili estas sufiĉe malproksimaj unu de la alia, ĉirkaŭ 125.000 km., por ke ĉiam unu el la du ricevu sun-radiojn. Tia sistemo liverus elektran potencon je 20 milionoj da kilo-ŭatoj (tia potenco estas 40 foje tiun de elektra centralo je 500 mega-ŭatoj).

Transporti la Energion ricevitan el Spaco

Tiu elektra Energio havigita per konvertado de la suna Energio ĉe la orbita centralo devas esti transformita por atingi la terajn instalaĵojn en plej bonaj kondiĉoj.

Kompreneble ne temas pri kabloj !


Oni uzos ultrakurtajn hercajn ondojn ; la plej bona ondolongo estas 10 centimetroj, ĉar ili nur tre malmulte, trairante atmosferon, perdas energion.

